

# Chateaubriand (1768-1848) Francisko-Renato, vicgrafo

Verkisto kaj politikisto

Aŭtoro: Christian Bertin

Dato: 22-an de Septembro 2007

## 1 Resumo

Francisko-Renato (François-René) Chateaubriand naskiĝis en Saint-Malo (Bretonio) en 1768.

Li estis la deka kaj lasta infano de ŝiproprietulo, kiu riĉiĝis per la sklavokomercio.

Li multe vojaĝis, verkis kaj aktivis sur la politika kampo.

Politike li havis sintenon kompleksan: advokato pro principo je religio kaj monarĥio (kvankam funde de lia koro, li fakte konsciis pri la nepraveco de la du! sed tio estis alia faceto de lia romantisma malespera koro), samtempe li admonis al plena libereco skriba kaj gazeta.

Lia beletra influo estis vasta, li iniciatis la romantismajn sentojn en Francio, enmodigis la senton pri "romantismaj" pejzaĝoj, kaj ŝaton al naturo, revenigon al religio post epoko de kontraŭreligiigo, la temon de la romantisma misestoso, de la malbonfataleco, ktp.

Liaj siatempe eldonitaj verkoj tamen nun ne plu furoras kiom en sia tempo, ĉar post du jarcentoj ili aperas ne sufiĉe naturaj, tro efektoserĉemaj, male liaj postmorte eldonitaj "Transtombaj memoraĵoj" nun multe pli ŝatatas, ili aspektas pli aŭtentaj, kaj en kiu brilas ĉiaj liaj stilofacetoj, kaj kie li scias kunteksi historion, sian personan destinon, kaj vivojn de aliaj personoj.

Li mortis en Parizo en 1848 kaj estis entombigita sur la insulo "Grand Bé" en Saint-Malo..

## 2 La vivo de Francisko-Renato Chateaubriand

La 4-an de Septembro 1768, Francisko-Renato Chateaubriand naskiĝis en la dua etaĝo de la palaco La Gicquelais, sur la strato de la judoj (rue des Juifs) en Saint-Malo (Bretonio).

Li estis la deka kaj lasta infano de René Auguste de Chateaubriand (1718-1786) kaj de Appoline Jeanne Suzanne de Bédée post:

- Geoffroy René Marie,
- Jean Baptiste Auguste,
- Marie Anne Françoise,
- Bénigne,
- Julie Marie Agathe,
- Calixte Anne Marie,
- N (mortnaskito?),
- N (mortnaskito?) kaj
- Lucile.

Lia patro estis ŝiproprietulo.

Nur kelkajn semajnojn post sia naskiĝo, li estis konfidita al nutristino en Plancoët.

En 1771, lia patro, kiu estis riĉiĝinta dank'al la sklavokomercio, aĉetis la kastelon de Combourg.

La familio Chateaubriand transloĝiĝis en 1771 al la unua etaĝo de la palaco White situanta 2, placo Chateaubriand en Saint-Malo. Tie li revenis, kiam li estis jam 3-jara kaj tie ili restis ĝis Februaro 1776, ĉar incendio devigis ilin transloĝiĝi denove.

De 1777 ĝis 1781, li studis en la kolegio de Dol.

En 1778, la familio transloĝiĝis al la kastelo de Combourg (pr.: kombur) en Bretonio.

Post 1781, Francisko-Renato studis en Rennes, Brest kaj Dinan en 1783 kun interrompoj por restadoj en la kastelo de Combourg.

La familio destinis lin al la maro. Kiam li estis 17-jara, li fariĝis vicleŭtenanto en la regimento de Navarre (Navaro). Poste li fariĝis kapitano, kiam li estis 19-jara.

Li aliris al Parizo en 1788, kie li amikiĝis kun Jean-François de La Harpe, Marie-Joseph Chénier, Jean-Pierre Louis de Fontanes (lia plej kara amiko) kaj aliaj. Tie li komencis verki versojn por la Almanako de la Muzoj.

Poste komenciĝis la franca Revolucio. En 1791, pro la popolaj ekscesoj, li preferis surŝipiĝi en Saint-Malo por vojaĝi al Ameriko. Dum unu jaro, li trairis la arbarojn de norda Ameriko, vivante kun la loĝantoj. Tio inspiris al li siajn unuajn verkojn (Atala, Renato, la Naĉezoj).

Komence de 1792, li revenis de Ameriko. Li edziĝis al Céleste Buisson de La Vigne en 1792, kaj iris al Coblenz por kuniĝi kun la armeo de la elmigrintoj. Vundita dum la sieĝado de Thionville, li estis transportita konvaleskanta al Ĵerzo. Tiel finiĝis lia militista kariero.

En 1793, li ekziliĝis al Londono. Sen regulaj enspezoj, li mizere vivis dum 7 jaroj, instruante la francan lingvon kaj tradukante. En 1797, li publikigis en Londono sian unuan verkon: Eseo pri la malnovaj kaj modernaj Revolucioj en rilato kun la franca Revolucio.

En 1800, li revenis de Anglio kun falsa pasporto je la nomo de David de la Sagne. Tre kortuŝita pro la morto de sia patrino en 1798 kaj de sia fratino Julie Marie en 1799, li reiris al la katolika kredo.

Dum pluraj jaroj, li redaktis Mercure de France kun Jean-Pierre Louis de Fontanes. En tiu revuo, li publikigis en 1801 la romanon "Atala", kiu fariĝis grava sukceso kaj tuj famigis lin.

En 1802, li publikigis la verkon "Renato" (fr.: René). Renato, la rolanto, fariĝis la modelo de la juna romantisma heroo por la legantoj kaj por la romantismaj verkistoj. En tiu verko, li priskribis sian amon ĉastan sed pasian al sia fratino Lucile.

La 14-an de Aprilo 1802, li publikigis "la spirito de Kristianismo" (fr.: Le génie du Christianisme), kio estis grava literatura okazaĵo, kiu estis la signalo por refortiĝo de la religio post la revolucio.

Rimarkita de Napoleono, li estis nomita en 1803, sekretario de la franca ambasado en Romo. Kun entuziasmo, li iris al Romo kun la kardinalo Fesch.

En 1804, li estis nomita reprezentanto de Francio ĉe la juna respubliko de Valezo, sed kiam li eksciis pri la ekzekuto de la duko de Enghien (pr. Engen) en la 20-a de Marto 1804, li tuj demisiis kaj fariĝis opozicianto al la Imperio

Noto: la duko de Enghien estis la heredinto de la franca reĝlando. Li vivis en Germanio. Laŭ ordono de Napoleono, li estis forrabita kaj ekzekutita en la kastelo de Vincennes por senkuraĝigi tiujn, kiuj esperis pri li por la restaŭro de la reĝlando.

En 1805, li enŝipiĝis kun sia familio por la Oriento, kaj vizitis Grekion, Turkion, Jeruzalemon kaj Egiption. Notoj pri tiu vojaĝo utilis por lia verko "La Martiroj" (fr.: Les Martyrs), kiun li publikigis en 1809.

Revene, en 1807, li izoliĝis en sia bieno la Vallée-aux-Loups, en la vilaĝo Châtenay-Malabry, apud Sceaux. Tie li verkis "La Martiroj" (fr.: Les Martyrs).

Li utilis la notojn de sia orienta vojaĝo por sia verko "La vojo de Parizo al Jeruzalemo" (fr.: L'Itinéraire de Paris à Jérusalem), kiun li publikigis en 1811.

En 1811, Chateaubriand estis elektita, kiel membro de franca Akademio, sur la seĝo de Marie-Joseph Chénier. Sed ĉar en sia projekto de akcepta parolado, li estis kritikinta iujn agojn de la revolucio, oni malpermesis al li sidi en la Akademio. Nur post la reĝlanda restaŭro, li rajtis sidi tie.

En la 30-a de Marto 1814, li skribis mordan pamfleton "Pri Buonaparte kaj pri la Burbonidoj" (fr.: De Buonaparte et des Bourbons), kiu multe helpis al la juna frato de Ludoviko la Deksesa por rekonkeri sian tronon.

Chateaubriand entuziasme akceptis la revenon de la Burbonidoj. Ludoviko la Dekoka regis de Aprilo 1814 ĝis Marto 1815.

Nomita franca ambasadoro en Svedio, li estis ankoraŭ en Parizo, kiam Napoleono revenis en 1815.

Li akompanis Ludovikon la Dekokan, kiam li fuĝis al Gand, kaj fariĝis membro de lia asistantaro. Li verkis por li la "raporto pri la stato de Francio" (fr.: Rapport sur l'état de la France).

Post la dua Restaŭracio, li fariĝis ŝtata ministro kaj estis nomita Lordo de Francio. Tio ne daŭris, ĉar en sia verko "La monarkio laŭ la Ĉarto" (fr.: La Monarchie selon la Charte", li kritikis la edikton de la 5-a de Septembro 1816, kiu malfondis la "netroveblan Asembleon". Pro tio li perdis sian postenon. Tiam li aliĝis al la ultrareĝisma opozicio kaj fariĝis unu el la redaktistoj de la gazeto de tiu partio Conservateur.

Okaze de la murdo de la duko de Karolo Ferdinando Berry (filo de la reĝo Karolo la Deka), en 1820, li skribis "La memoraĵoj pri la vivo kaj la morto de la duko" (fr.: Mémoires sur la vie et la mort du duc).

Ankaŭ en 1820, li estis nomita ministro de Francio en Berlino.

En 1822, li estis nomita ambasadoro en Anglio. Tie lia kuiristo inventis la kuirmanieron de la bovpeco, nomita per lia nomo.

En 1822, li partoprenis la kongreson de Verono, kiel plenrajtigito. Li decidigis pri la milito de Hispanio malgraŭ la kontraŭstaro de Britio. Revene, li rekompence fariĝis ministro pri la

eksterlandaj aferoj. Li sukcesis en la milito de Hispanio kun la kapto de la urbo urbo sekve de la venko de Trokadero (fortikaĵo de Andaluzio) en 1823 fare de la duko de Angoulême.

Sed ĉar li ne akordiĝis kun la asistantarestro S-ro de Villèle, li estis abrupte eksigita la 5-an de Junio 1824.

Sekve li aliĝis al la liberala partio en la opozicio. Li batalis kopontraŭ la grafo Villèle per sia posteno en la ĉambro de la Lordoj kaj per siaj skriboj en la gazeto "Journal des Débats". Li aktivis por la gazetarlibereco kaj por la sendependeco de Grekio.

Post la falo de la ministraro Villèle en 1828, li fariĝis ambasadoro en Italio sed demisiis kiam la ultrareĝisma politikisto Polignac fariĝis prezidanto de la Konsilio en 1829.

Post la Revolucio de 1830, senespera pri la estonteco de la monarkio, li rezignis pri ĉiuj ajn politikaj kaj registaraj postenoj kaj izoliĝis por skribi siajn memoraĵojn.

Li nur kritikis la novan registaron per artikoloj, kia "Pri la Restaŭrado kaj la balotita Monarkio" en 1831.

Fine post provo de komploto kun la dukino de Berry kontraŭ la reĝo Ludoviko-Filipo la Unua en 1834, li definitive forlasis la politikon.

En 1844 li publikigis sian verkon "la vivo de Rance" (fr.: La Vie de Rancé).

Fine de sia vivo, li eliris nur por viziti Juliette Récamier, fidela amikino, kiu en sia salono, kunvenigis la stelojn de la literatura mondo.

Li laboris pri siaj memoraĵoj "La transtombaj Memoraĵoj" (fr.: Les Mémoires d'outre-tombe) preskaŭ ĝis sia morto sed ili estis publikigitaj nur post lia morto. Pro konstanta manko de mono, jam en 1836, li estis vendita siajn rajtojn al kompanio, kiu certigis al li konstantan enspezon ĝis lia morto.

Edziĝinta al Céleste Buisson de La Vigne en 1792, li travivis multajn amaferojn, inter ili:

- Charlotte Ives kiam li estis en Londono,
- Pauline de Beaumont Delpine de Custine (1802),
- Juliette Récamier (1818)
- Cordélia de Castellane (1823).

Francisko-Renato de Chateaubriand mortis la 4-an de Julio 1848 kaj estis entombigita la 19-an de Julio, laŭ siaj lastaj voloĵoj, sur la insulo Grand-Bé, piede alirebla je malalta tajdo de la plaĝo de Saint-Malo (Bretonio).

Li estis defendinto de la legitima reĝeco kaj de la libereco.

### 3 Verkoj de Francisko-Renato Chateaubriand

- Eseo pri revolucioj (*Essai sur les révolutions*, 1797)
- Atala (*Atala*, romano, 1801, ankaŭ parto de *spirito de kristanismo*)
- Renato (*René*, romano, 1802, ankaŭ parto de *spirito de kristanismo*)
- la spirito de kristianismo (*Le génie du christianisme*, 1802)
- la Martiroj (*Les Martyrs*, 1809)
- vojo de Parizo al Jerusalemo (*L'itinéraire de Paris à Jérusalem*, 1811)
- la Naĉez (*Les Natchez*, 1826)
- aventuroj de la lasta Abenceraĝo (*Les Aventures du dernier Abencérage*, 1826)
- vojaĝo en Ameriko (*Voyage en Amérique*, 1827)
- vivo de Rance (*La Vie de Rancé*, 1844)
- transtombaj memoraĵoj (*Mémoires d'outre-tombe*, verkata de 1809 ĝis 1841, postmorte eldonita)

#### 3.1 Eseo pri la revolucioj (*Essai sur les révolutions*, 1797)

Ĝi estas historia, politika kaj morala eseo pri la maljunaj kaj modernaj revolucioj en rilato kun la franca Revolucio de 1789.

Li neas la homan progreson. Por li la historio ripetiĝas kaj do povas utili por kompreni la modernan mondon. Li demandas sin pri la rolo de la franca Revolucio. Li malaprobas la malnovan Reĝimon, kiu incitegis la popolon kaj la milojn da gilotinoj starigitajn dum la franca Revolucio.

Li montris la perversajn efikojn de la Lumoj, kio estas la racia kono en la 18-a jarcento, kiu rifuzas la arbitran aŭtoritaton, la absolutan monarkismon, la fanatikismon (ĉefe religian) kaj apogas la progreson de la artoj kaj sciencoj.

#### 3.2 Atala (*Atala*, romano, 1801, ankaŭ parto de *spirito de Kristianismo*)



**Atala aŭ la amo de du sovaĝuloj en la dezerto.**

La tribo de la Naĉezoj (fr.: Natchez) vivas sur la bordoj de la rivero **Meschacébé (fakte Misisipio)**, en Luiziano (Usono). Ili akceptis Renaton, kiu estas franco.


Ĉaktas (fr. Chactas) estas maljuna indiano, kiu vizitis Francion dum la reĝado de Ludoviko la Dekkvara. Li amikiĝis kun Renato kaj rakontis al li la aventurojn okazintajn en sia junaĝeco.

Kiam li estis 20-jara, li estis kaptita de malamika tribo kaj savita de Atila, juna indianino edukita laŭ la kristana religio. Ili kune fuĝis tra la arbaro kaj rekontis la pastron Aubry (pr.: Obri), kiu deziris konverti Ĉaktas kaj geedzigi ilin.

Sed la patrino de Atila estis konsekrita ŝin al la Virgulino kaj Atala kredis ke tiu ĵurpromeso estis nediskutenda. Por ne cedi al la amo al Ĉaktas, ŝi mortigis sin.

Eblas pensi ke malantaŭ tiuj du roloj estas juna anglino, kiun Francisko-Renato amis, kaj Francisko-Renato mem

### **3.3 Renato (René, romano, 1802, ankaŭ parto de spirito de Kristianismo)**



#### **Renato aŭ la efikoj de la pasioj**

Post la rakontado de Ĉaktas, Renato siavice rakontas pri siaj junaj jaroj por klarigi sian nekuraĉeblan melankolion.

Lia infanjaroj estis plenaj je pasiaj revoj. Poste vojaĝoj sentigis lin pri lia izoleco meze de la homoj. Post pluraj jaroj plenaj je ekzaltiĝo kaj deliroj kun sia fratino Amelio (fr.: Amélie) li decidis forlasi Francion por iri al Ameriko. Amelio, siaflanke, pro la tenereco, kiun ŝi sentis al Renato, preferis eniri monaĥinejon.

La verko Renato estas aŭtobiografio. La infanaĝa revado de Renato similas al tiu de la aŭtoro.

### 3.4 *la spirito de kristanismo (Le génie du christianisme, 1802)*



Per tiu libro Chateaubriand sukcesis reveki intereson por la religioj, kaj parte por Kristianismo post la franca Revolucio, kiu frakasis multajn religiajn simbolojn.

Chateaubriand, tiel, rebatis al la filozofoj, kiuj forte atakis la religiojn por batali kontraŭ la obskurantismon.

#### **La libro enhavas kvar partojn:**

##### **1-a parto: Dogmoj kaj doktrinoj**

Kristianismo sin trudas al ĉiuj pro la beleco de siaj dogmoj, de siaj sakramentoj, de siaj teologiaj virtoj, de siaj sakralaj tekstoj. La harmonio de la mondo kaj la mirindaĵoj de la naturo pruvas la ekziston de Dio.

##### **2-a parto: poetiko de kristianismo**

Neniu religio, pli ol kristianismo, tiel profunde esploris la misterojn de la homa animo kaj tiel sensis la belaĵojn de la universo.

##### **3-a parto: belartoj kaj literaturo**

Kristianismo favoris la prosperon de la belartoj. Ĝi subtenis la laborojn de la sciencistoj, de la filozofoj kaj de la historiistoj. Ĝi inspiris multajn verkistojn.

##### **4-a parto: kulto**

Sonorado de sonoriloj, ornamoj de konstruaĵoj, soleneco de la diservoj, ĉio kunagas por la animemocio.

La misiistoj disvastigis siajn socialajn agojn.

Naskita sur la ruinoj de la roma imperio, Kristianismo savis la civilizacion.

Chateaubriand asertis, ke li triumfe elstaros el la tiama puriga periodo.

### 3.5 *la Martiroj (Les Martyrs, 1809)*

Per tiu romano, li volis prui la superecon de Kristianismo kompare al paganismo en la disvolviĝo de la karakteroj tra la pasioj.


Eŭdoro (Eudore), kristiana oficiro de la roma armeo rakontas siajn vojaĝojn kaj amojn, antaŭ ol morti en la areno, kune kun sia edzino Cimodocea (Cymodocée), juna grekino, kiun li konvertis.

Tio estas la vivrado de junulo, kiu naskiĝis pagano por morti kiel martiro.

La epizodo de la amo de Eŭdoro kaj Velleda (Velléda), la gaŭla druidino estas certe la plej korpema. Denove estas sceno pri malsamkulturaj geamantoj, sed ĉi-foje ili transpasas la permeslimon.

### 3.6 *Transtombaj memoraĵoj (Mémoires d'outre-tombe, verkata de 1809 ĝis 1841, postmorte eldonita en 1848)*

Unufoje eldonita en 1848, post modifo de la eldonistoj, por publikigi ĝin en formo de felietono.



En tiu verko, Chateaubriand priskribis la ĉefajn epizodojn de sia propra aventura vivo: tra la bretonaj erikejoj, la arbaroj de norda Ameriko, kun la armeo de la princoj en Germanio, en la ekzilo de Britio, en la eksterlandaj ambasadoj.

Tio estas funebra parolado por rakonti la ŝanĝojn de la socio dum lia vivo rilataj al la pejzaĝoj, la moroj, la kredoj, la institucioj kaj la morto de la homoj.

La naturo, la maro, la amo, la juneco inspiris lin.

Li verkis por akiri surteran senmortecon aldone al la kristiana senmortecon.

Li ne amis napoleonon sed admiris lin pro lia grandeco.

Vi povas trovi la lokon, kie li finverkis tiun verkon en: Parc départemental de La vallée aux Loups - La Maison et parc de Chateaubriand en Châtenay-Malabry (92).

## 4 Portretoj de Francisko-Renato Chateaubriand



*Portreto de F.-R. de Chateaubriand, (detalo; ĉ. 1807)*

Girodet-Trioson,  
Muzeo de Saint-Malo, Bretonio, Francio







Tombo de Chateaubriand sur la insulo "Grand Bé" en Saint Malo

Foto de Remi Jouan en Majo 2007

Permeso : Own work, copyleft: Multi-license with GFDL and Creative Commons CC-BY-SA-2.5 and older versions (2.0 and 1.0)

### **Biografioj pri Chateaubriand**

Paul de Noailles, lia postsidinto en la Akademio, Scipion Marin kaj Jacques-François Ancelot, François-Zénon de Collombet, Sainte-Beuve kaj Charles Benoît skribis biografiojn pri Chateaubriand.

Antaŭnelonge, biografioj estis skribitaj de Jean d'Ormesson, en 1988, de Ghislain de Diesbach, en 1995, de Jean-Paul Clément, en 1998, de André Maurois en 2005.

### **Citaĵoj**

"Kial do la homo konsentas fari tion, kion li faras sur tiu-ĉi tero, estante mortonta?"

## 5 Datoj rilataj al Francisko-Renato Chateaubriand

- 1768 Naskiĝo en Saint-Malo de Francisko-Renato de Chateaubriand, deka infano de René-Auguste de Chateaubriand kaj de Apolline de Bédée. Konfido al nutristino en Plancoët.
- 1771 Reveno al Saint-Malo
- 1777-1781: Studado en kolegio de Dol.
- 1781-1783 Studado en Rennes kaj Brest.
- 1783 Studado en kolegio de Dinan.
- 1791 Enŝipiĝo en Saint-Malo por Ameriko. Elŝipiĝo en Baltimore kaj trairo de la arbaroj de norda Ameriko
- 1792 Reveno de Ameriko por kuniĝi al la armeo de la elmigrintoj en Coblenz. Vundita dum la sieĝado de Thionville. Transportita konvaleskanta al Ĵerzo.
- 1793/01/21 Gilotinado de la franca reĝo Ludoviko la Deksesa.
- 1793 Ekziliĝo de Chateaubriand al Londono.
- 1794/04/22 Ekzekuto de Jean Baptiste Auguste, frato de Francisko-Renato Chateaubriand
- 1797 Publikigo de la "eseo pri la revolucioj" (fr.: Essai sur les révolutions) en Londono.
- 1798 Morto de Apolline de Bédée, patrino de Francisko-Renato Chateaubriand
- 1799 Morto de Julie Marie, fratino de Francisko-Renato Chateaubriand
- 1799/11/09 Renverso de la franca Ŝtato, preparita de Sieyès
- 1800 Reveno de Anglio al Kalezo (fr.: Calais) kun pasporto je la nomo de David de la Sagne  
Napoleono Buonaparto fariĝis la unua konsulo.
- 1801 Restado ĉe S-ino de Beaumont.  
Publikigo de Atala.
- 1802 Publikigo de "Renato" (fr.: René) kaj "La spirito de kristianismo" (fr.: Le Génie du Christianisme)
- 1803 Nomita sekretario de la ambasado en Romo. Morto de S-ino de Beaumont.
- 1804 Kupto kaj ekzekuto de la duko de Enghien
- 1804/11/09 Morto de lia fratino Lucile.
- 1806 Publikigo de "Vojaĝo al la Monto Blanka".
- 1807 Akiro de la ermitejo "Vallée-aux-loups" (Valo de la lupoj)
- 1809 Publikigo de "La Martiroj" (fr.: Les Martyrs)
- 1811 Elektita membro de la franca Akademio. Sed li ne rajtis sidi ĉar lia parolado ne estis aprobita.  
Publikigo de "Vojo de Parizo al Jeruzalemo" (fr.: Itinéraire de Paris à Jérusalem)
- 1814 Publikigo de "Pri Buonaparto kaj la Burbonidoj"
- 1815 Reveno de Napoleono kaj foriro de Chateaubriand al Gand kun la eksigita reĝo Ludoviko la Dekoka dum 100 tagoj.
- 1816 Publikigo de "La monarkio laŭ la Carto"
- 1820 Murdo de la duko de Berry, dua filo de la reĝo Karolo la Dekka.
- 1822 Nomita ambasadoro en Londono
- 1823 Amorantino de S-ino de Castellane
- 1824 Eksigita de la registaro
- 1826 Publikigo de "lasta Abenceraĝo", de "Naĉezoj"
- 1827 Publikigo de "Vojaĝo en Ameriko"
- 1828 Nomita ambasadoro en Romo.
- 1830 Revolucio (27-a ĝis 29-a de Julio)  
Grava parolado en la Ĉambro de la Lordoj kaj demisio.

- 1831 Publikigo de "Historiaj studoj"
- 1833 Publikigo de la memuaro pri la mallibereco de la dukino de Berry
- 1836 Eseo pri la angla literatura
- 1838 Plenrajtigitio en la Kongreso de Verono, kiu decidis pri Milito de Hispanio.
- 1844 Publikigo de "Vivo de Rance"
- 1847 Morto de la edzino de Chateaubriand
- 1848/02/24 Abdiko de la reĝo Ludoviko-Filipo. Oficiala proklamo de la Respubliko.
- 1848/07/04 Morto de Chateaubriand.
- 1848/07/19 Entombigo de Chateaubriand sur la insulo Grand-Bé en Saint-Malo.
- 1849 Morto de S-ino Récamier.

## 6 Referencoj

- [1] XIXe siècle: Les grands auteurs français du programme, André Lagarde et Laurent Michard, Editions Bordas
- [2] Wiki en esperanto
- [3] <http://romantis.free.fr/chateaubriand/html/chaindex.html>
- [4] [http://fr.wikipedia.org/wiki/Fran%C3%A7ois-Ren%C3%A9\\_de\\_Chateaubriand](http://fr.wikipedia.org/wiki/Fran%C3%A7ois-Ren%C3%A9_de_Chateaubriand)
- [5] <http://www.bacdefrancais.net/biochateaubriand.htm>
- [6] <http://www.terresdecrivains.com/Francois-Rene-de-CHATEAUBRIAND.html>



Kastelo de Combourg (vizitebla)

- [7] <http://bac-francais.hyadex.fr/ecrivains/chateaubriand/biographie-chateaubriand.php>
- [8] <http://www.academie-francaise.fr/immortels/base/academiciens/fiche.asp?param=319>
- [9] <http://195.221.67.12/pedagogie/lettres/chmalo.htm>



Entombigo de Chateaubriand sur la insulo Grand-Bé, la 19-an de Julio 1848,  
Valentin-Louis Doutreleau, oleo sur tolaĵo,  
Foto de Michel Dupuis, komunika servo, urbo de Saint-Malo.

## 7 Tabelo de la enhavo

Chateaubriand (1768-1848) Francisko-Renato, vicgrafo .....	1
1 Resumo.....	1
2 La vivo de Francisko-Renato Chateaubriand .....	1
3 Verkoj de Francisko-Renato Chateaubriand .....	5
3.1 Eseo pri la revolucioj (Essai sur les révolutions, 1797) .....	5
3.2 Atala (Atala, romano, 1801, ankaŭ parto de spirito de Kristianismo) .....	5
3.3 Renato (René, romano, 1802, ankaŭ parto de spirito de Kristianismo) .....	6
3.4 la spirito de kristanismo (Le génie du christianisme, 1802).....	7
3.5 la Martiroj (Les Martyrs, 1809) .....	7
3.6 Transtombaj memoraĵoj (Mémoires d'outre-tombe, verkata de 1809 ĝis 1841, postmorte eldonita en 1848).....	7
4 Portretoj de Francisko-Renato Chateaubriand .....	8
5 Datoj rilataj al Francisko-Renato Chateaubriand .....	10
6 Referencoj .....	11
7 Tabelo de la enhavo .....	12